EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado

UEA ilei IF EF

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 53 >** • ILEI • Pollando • Festotagoj • UN • Italio **< sept. 26**

# ILEI transdonas gravegan funkcion

ILEI ĉiam bezonas fakulon por prizorgi la adresaron kaj membro-administradon, kaj por ILEI kaj ĝiaj revuoj IPR (Internacia Pedagogia Revuo) kaj Juna Amiko (la revuo por lernantoj). Tio ne estas honor-posteno, ĝi postulas multegan laboron kaj grandan precizecon kaj respekton de limdatoj. Pere de la admirinda duopo Oberrauch Madella (panjo) kaj Alessandra Madella (filino), EKO eksciis, ke la esenca tasko de administranto transiris de la multjara plenumanto Sebastian Cyprych el Pollando al Hamzeh Sahfiee el Irano.

EKO dankegas al Sebastian Cyprych pro la multjara servado – mi korespondis kun li, kiam mi antaŭlonge prizorgis la administradon de Juna Amiko antaŭ almenaŭ 15 jaroj. Certe ankaŭ ILEI jam esprimis siajn dankojn.

La praktikaj paŝoj por la transdonado de la datumoj kaj aliaj bezonaĵoj nun okazas kaj en tio Italio ludas aktivan rolon. Ĉu vi rimarkis, ke la du koncernataj landoj (Irano kaj Italio) estas ĝuste tiuj, kiujn EKO, nome de UEA, laŭdis pro la elstara agado per la titolo 'Landa Elano' en EKO 50. Refoje ili pruvas sian meritadon de la laŭdado.

# Poloj legas kune

En septembro 2022 okazis en Pollando la sekva Nacia Legado-tago, dum kiu oni legas la saman elstaran beletraĵon. Esperantistoj en Pollando kaj en kelkaj aliaj landoj denove partoprenis, legante en Esperanto. La partopreno estas oficiala - iliaj lego-renkontiĝoj estas registritaj en la listo de festantoj, ĉe la prezidento de Pollando. La festo nun estas internacia:
Aktualności \ Inicjatywy \ Narodowe Czytanie \ 2022 Ballady i romanse \ Uczestnicy akcji \ Oficjalna strona Prezydenta Rzeczypospolitej Polskiej - Kraj - lando).

Kiel la legaĵo por 2022 estis elektita la poemaro 'Baladoj kaj romancoj' de Adam Mickiewicz, unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la eŭropa romantikismo. Nun oni festas la 200-an datrevenon de la apero de tiu grava kaj interesa verko, kiu komencis la epokon de romantikismo en la pola literaturo. La libron en Esperanto eldonis (2022) la Bjalistoka Esperanto-Societo kaj la regiona Podlaĥia Libraro samurba. La tradukintoj de la poemoj estas Antoni Grabowski, Lidia Ligęza kaj Walter Żelazny. La esperantistoj-partoprenantoj en la legado havas ĉiujare alireblon al novaj tradukoj dank' al nia tre bona kunlaboro kun Przemysław Wierzbowski.

Ni vidas avantaĝojn el tio. Jen kelkaj.

- Esperanto funkcias kiel ponto inter kulturoj. Per tiu legado esperantistoj ekkonas la alilandan literaturon kaj aparte, per iuj verkoj, lernas ankaŭ kompreni la realon, en kiu vivis L. Zamenhof.
- Esperantistoj aperas en vasta medio nemovada, estas rimarkataj kaj menciataj de ĵurnalistoj, altrangaj politikistoj k.a. Ni, esperantistoj, devas esti vidataj, alie oni neas nian ekziston (konstato bazita sur gravaj faktoj).
- Eblos lerni ion novan pri manieroj alloge prezenti kulturon.
- La partopreno de esperantistoj en la festo spronas eldonadon de la ĉefaj verkoj de la pola literaturo en Esperanto.
- La agrabla kaj pensiga lego-renkontiĝo fortigas la ligojn inter la partoprenantoj, kio favoras kunlaboron.

Krom polaj esperantistoj, speciale tiuj en Bjalistoko, ankaŭ tiuj en Krakovo kaj foje en aliaj urboj, grupan legadon en Esperanto organizas jam de 5-6 jaroj esperantistoj en Japanio - Nitta Takamichi, Brazilo - Alvaro Motta, Bulgario - Mariana Evlogieva kaj Kroatio - Marija Belošević. Unufoje partoprenis la feston ankaŭ Togolando, dank al' organizaj zorgoj de Koffi Doumegnon.

Valoras vidi l**a raportetojn kaj filmetojn** pri iliaj interesaj kaj valoraj aranĝoj el 2021. Ili montras, kiel oni povas legi, ekkoni kaj ĝui beletron per Esperanto. Speciale aŭskultindaj estas la vortoj de Paulo Sergio Viana.
PRI LA NACIA LEGADO EN E-O EKSTER POLLANDO, 2021

Maria Majerczak

# UN fidele kaj regule

**Numero 60 – septembro – oktobro 2022**

- Universala Kongreso de Esperanto renkontiĝis en Montrealo, publikigis deklaron
- pri indiĝenaj lingvoj.
- Duolingo vastigis siajn Esperanto-rimedojn.
- Lingvo kaj amikeco por paco.
- La spirito de Esperanto en Unuiĝintaj Nacioj.
- Remeti CDE-4 survoje post KOVIM-19: La fundamenta rolo de multlingvismo en edukado

Ni alkroĉas la numeron.

# Festado de la plej indaj 'Tagoj'

En la pasintaj semajnoj okazis interkonsultiĝo inter kelkaj aktivuloj pri ĉi tiu temo. Sekve de tio formiĝis iniciata grupo, konsistanta el Humphrey Tonkin, François Lo Jacomo, Renato Corsetti, Stefan MacGill kaj Michela Lipari, kiuj okupiĝas pri ĉi tiu temo, kiu havas du flankojn:

- esperantistoj festu sian nacian tagon, la 26-an de julio, antaŭ ol peti rekonon de la ekstera mondo
- samtempe ni daŭrigu la agadon de Trezoro en la pasinta estrara mandato por peti rekonon de tiu tago kiel Internacia Tago de Esperanto fare de Unesko

Por la atingo de ĉi tiuj du celoj ni bezonos vastan kunlaboron en la movado kaj la komitatanoj estas petataj esprimi sian kunlaboremon al unu el la membroj de la. Evidente, poste, ni petos kunlaboron de viaj asocioj, revuoj, ktp.

Mi kaptas la okazon por informi vin ke la oficejo de UEA ĉe UN pretiĝis por partopreni la agadojn dum la Tago de Paco, la 21-a de septembro, kaj François Lo Jacomo kiel reprezentanto de UEA ĉe Unesko organizas la partoprenon de esperantista ĥoro, kiu kantos kune kun aliaj ĥoroj el pluraj landoj en evento de Unesko rilata al la sama tago en Toloso, Hispanio. Aperos raporto en EKO 55.

Renato Corsetti

# ILEI raportas pri reagoj

Post la kongreso VEKI 3 mi ricevis multajn retmesaĝojn de niaj samideanoj el diversaj partoj de la mondo. Mi estas ĝoja pro tio kaj mi sendas al vi kelkajn informojn pri tio:

- Aranka Laslo el Serbio sendis belan jarraporton kaj plu sendis ĝin al IPR.
- Pia Wetergren konfirmis ke ŝi daŭrigas sian laboron kiel sekciestro de la dania ILEi-sekcio kaj ke la komitatano estas Ileana Shroeder.
- Alexandrine Omba el Kongo informis min ke ŝi volus kaj planas organizi Virinan Esperanto-Kongreson en Kinŝaso la 5-an de novembro. Mankas al ŝi mono kaj lernolibroj. Se iu havas, helpu.
- El Brazilo Aristofio sendis la liston de ILEI-membroj. Krom li Adonis Saliba el Brazila Esperanto-Ligo informis min ke li organizas virtualan kurson de Esperanto sub la titolo <Mia amiko>.
- Ruben el Argentino informis, ke li mem membriĝis al ILEI, mankas homfortoj.
- Bard Hekland informis min ke respondeculo por Norvegio estas Marianne Lund, la respondeculo de instruado estas Juha Metaskallas. ILEI-sekcio por ili ne estas prioritato.
- El Nederlando Rob Moerbeek informis min ke S. Smits estas sekretario sed mankas homfortoj kaj li proponas, kie utilas, kunligiĝi kun sekcioj de najbaraj landoj.
- Por Finnlando respondeculo estas Juha Metaskallas.
- ILEI-Afriko havis kunsidon kaj elektis novajn sekciestrojn: Togolando: Gbeglo Koffi, Burundo:Gilberton Ndibokubways. Reelektitaj estas; Tanzanio: Mulele Mbassa, Kongo: Mawomo Mafuila.
- Pri Bosnio: mi ricevis tri retadresojn de Dokumenta Esperanto-Centro el Kroatio: unu de Bosnia Esperanto-Asocio kaj du privatajn de niaj Esperantaj kolegoj el Bosnio. Retmesaĝoj sen respondo. Mi klopodos plu.
- Mi mem membriĝis al societo Poligloto en Zagrebo. Ili estas subtenataj de la urba administracio. Ili vokis min, ke mi gvidu Eo- kurson kaj mi konsentis. Esperantistoj el Kroatio kunvenos la 24-an de septembro por omaĝi al la Tago de la Lingvo.

Marija Jerkoviĉ, estrarano pri landa agado de ILEI.

# Hispanio aktivas kurse

De: **edukado.net** <redaktanto@edukado.net>

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: IES Almenara
Gvidantonomo: A. Fabián Jiménez
Tipo: Nova lerneja kurso
Loko: Vélez-Málaga, Hispanio
Aldoninto: FabianJ
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27446




## Italio brilas pri la anoncado de kursoj

Septembro estas tradicie la monato por la komenco de kursoj. Italio modele agas per anoncoj al la publiko pri retkursoj per la sloganoj, ke la lingvo internacia estas logika, rapide lernebla kaj egaleca. Tamen, la afiŝo anoncas kurson, kiu ekos en novembro.

## Pisa invitas

Inter la 18-a kaj la 20-a de novembro okazos aranĝo kun ri ca programo. Legu en la alkroĉaĵo.

## Fondaĵo Canuto

La Fondaĵo, kiu subtenas la membrigon de personoj, kiuj deziras esti membroj sed al kiuj mankas la necesaj rimedoj, ĵus preteriris la nombron da subtenataj el 2021 (552) kaj nun havas *555 subtenojn. Ĉiam bonvenaj estas donacoj al la Fondaĵo, ĉar ne malaperos la bezono en 2023.

========= vortoj: 1285 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo 2022 (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.